




# Brazila Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

114-a jaro - N-ro 363 - Julio 2021



## La interreto kaj ni

Paĝo 3

**Intervjuo:  
Túlio Flores**

Paĝo 6

**Kafpaŭzo**

Paĝo 9

**Nia literatura  
panteono**

Paĝo 10

**Ŝtataj lernejoj  
en San-Paŭlo**

Paĝo 12





# Brazila Esperantisto

Nacia kaj Internacia Kulturo  
114-a Jaro • N-ro 363 • Julio 2021



Kovrilo: Bildo de Gerd Altman el Pixabay.

# Enhavo

- 03 Ĉefartikolo** La interreto kaj ni
- 06 Intervjuo** Túlio Flores
- 07 BEJO** Literatura Konkurso Paulo Silas
- 08 Movado** Esperanta Kafejo
- 08 En la Reto** BEL en Telegramo - Retradio - PIV en la reto
- 09 Kafkaŭzo**
- 10 Literaturo** Nia literatura panteono: Kálmán Kalocsay
- 11 Debuto** Via unua artikolo en Brazila Esperantisto  
Ŝtataj lernejoj en San-Paŭlo kaj la instruado dum la pandemio
- 13 Lingva Angulo**

# Enkonduko

La invento de la presarto fare de Johano Gutenbergo respondecas pri unu el la plej rimarkindaj konkeroj en la historio de la homaro. Ĝi, kune kun la rolo de la latina kiel internacia lingvo, disvolvis kaj diskonigis la valorojn de grava kulturo, kiu impresas la mondon ĝis hodiaŭ.

Nuntempe ni spertas alian inventon same epokfaran: la internacian reton de komputiloj - la interreton. Nia kovrila rubriko esploras flankan aspekton de tiu vasta temo. Flankan, tamen neneglektindan.

Vi rimarkos krome, ke BE inaŭguras novan konstantan rubrikon: "Via Unua Artikolo". En ĝi novaj esperantistoj havos okazon montri siajn ideojn al nia legantaro. Kuraĝu verki por BE, sendu vian kontribuon al nia gazeto.

Per tia libera interŝanĝo de pensoj kaj ideoj, Esperanto plu kaj plu prenas por si, dum ĉi tiu interreta epoko, la rolon, kiun la latina ludis dum la Gutenberga revolucio.

Bonan legadon!  
La redakta skipo

**BE** **Brazila Esperantisto**

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo  
Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser  
114-a jaro, N-ro 363, Aŭgusto 2021

**Eldona Stabo**

**Ĉefredaktisto:** Cícero Gabriel C. Soares  
redakcio@esperanto.org.br

**Ĉi-numeraj kunlaborantoj:** Anna Lobo, César Dorneles, Cícero Soares,  
Leandro Abrahão, Leono de Bonaero e Nympha Aparecida

**Grafika aranĝo kaj enpaŝigo:** Allan Argolo

**Revizio kaj tradukado:** Josenilton

Kontribuajojn kaj mesaĝojn sendu al la ĉefredaktisto: [redakcio@esperanto.org.br](mailto:redakcio@esperanto.org.br)

**Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**



**Brazila Esperanto-Ligo**

Fondita en 1907

**Sidejo:** SDS-Bloco P36-Salas 301/303-Ed. Venâncio III  
CEP 70393-902 Brasília, DF  
**Telefona:** (0xx61) 3226-1298

**Retadreso:** [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br) **Hejmpaĝo:** [www.esperanto.org.br](http://www.esperanto.org.br)

**Estraro**

**Prezidanto:** Evandro Avellar **Vic-prezidanto:** Querino Neto

**Financdirektisto:** Fernando Maia Jr. **Kasisto:** Sônia Maria A. Lucio

**1-a Sekretario:** Rodrigo Tavares P. De Medeiros **2-a Sekretario:** Leandro Oliveira Freitas

**3-a Sekretario:** Márcia Maria C. Avellar

**Kontrolo Konsilantaro**

Eurípedes A. Barbosa, Darci Sardinha, Maria Das Dores Goes

**Komitatano-A**

Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr.

**Ĉefdelegito de UEA**

Alex Sousa Santos

**Revukunlaboraĵoj:** La ĉefredaktisto rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajton: **1-e:** ne sciigi la ricevon; **2-e:** ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** ne garantii la publikigon; **4-e:** mallongigi tekstojn tiam, kiam necese; **5-e:** ilin reviziigi laŭ ortografio, gramatiko kaj fakvortoj. **a)** Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, de Bertilo Wennergren. **b)** La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2020) oni aparte klarigu per piednotoj aŭ glosaro. **c)** Ni uzos esperantigitajn ŝtato-nomojn kaj urbo-nomojn trovitajn en <http://vortaro.esperanto.org.br>. **d)** Ĉiam kiam eblas ni uzos simplajn vortojn kompreneblajn kaj konstruatajn surbaze de la krea kapablo de Esperanto anstataŭ la novaj radikoj (neologismoj) laŭ <http://bonalingvo.net/> **e)** Ni uzos la sistemon -UJO por landnomoj laŭ la fundamentaj reguloj de la lingvo (kiujn oni eltiras el la libreto La Fundamento de Esperanto).

Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustrati kaj apartenas al la posedantoj.

**Anonctarifoj:** Tabelo pri prezoj de anoncoj en *Brazila Esperantisto*, laŭ paĝonoj.

tutpaĝa (18x25cm)  
4-a kovrilo  
R\$ 900,00 (kolora)  
3-a kovrilo  
R\$ 600,00  
(nigra-blanka)

1/2 duonpaĝa  
(9x24cm)  
R\$ 450,00 (kolora)  
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa  
horizontale  
(18x8cm) R\$ 300,00  
(kolora)  
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa  
vertikale  
(5,8x24cm)  
R\$ 300,00 (kolora)  
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa  
(5,8x12cm)  
R\$ 150,00 (kolora)  
R\$ 100,00 (nigra-blanka)





# La interreto kaj ni

Cícero Soares

*La TTT, Tuttera Teksaĵo, kreis revolucion tiel grandan kiel tiu de Gutenberg. Ĉu ĝi havas la saman efikon por la homa cerbo?*

Ni povas klasi la malsimilajn teknologiojn kreitajn de la homoj en kvar grupojn: mekanikajn, sensecajn, natur-ŝanĝajn kaj intelektajn.

En la unua klaso enestas la teknikaro kiu ampleksigas niajn fizikajn kapablojn, ekzemple: la rado, la plugilo, la kudrilo, la aviadilo.

En la dua, ili pligrandigas la povon de niaj kvin sentumoj: mikroskopoj, sonlaŭtigiloj, binokloj...

La tria grupo enhavas kreaĵojn, kiuj intervenas en la naturon por pli bone servi al niaj deziroj aŭ necesoj, kiel la kontraŭkoncipa pilolo aŭ la genetike modifita greno.

Apartenas al la kvara grupo la kreaĵoj kiuj celas vastigi la homan mensan kapablon. Kion tiu kapablo plenumas? Ĝi trovas kaj klasifikas informojn; eltrovas kaj manovras ideojn; kundividigas konojn; mezuras kaj kalkulas; enmemorigas kaj elmemorigas faktojn. Inter la rimedoj de tiu grupo troviĝas la tajpmaŝino, la sorobano (japana abako), la libro, la lernejo, la biblioteko, la komputilo, la Interreto...

La ĉefa diferenco inter la kvar grupoj por ni, homaj estuloj, venas de tio, ke la eltrovaĵoj el la kvara grupo, la intelekta, ŝanĝas nian cerbon! Post kiam tiaj teknikoj populariĝas, ili kreas novajn manierojn pensi kaj rezoni. Kaj la tuta socio moldiĝas al ili, ĉar pensmanieroj antaŭe limigitaj al malmultenombra grupo etendiĝas al ĉiuj. Do ni inventas kaj moldas intelektajn teknikajn procedojn, sed ili inverse same regas kaj moldas

nian konduton - kaj individuan kaj socian.


Pensu ekzemple pri la socio antaŭ la inventado de la horloĝo. Tuta vivo sen precizaj kaj akurataj hormezuroj, sen minutskalaj antaŭkonsentoj, sen neceso aŭ ebleco pri akurateco. Kaj ju pli oni lernas uzi la novan teknikon, des pli da postuloj por ĝia evoluado naskiĝas. La cerbo lernas pensi laŭ tiuj kriterioj. Ekzemple: La unuaj mapoj kreitaj estis ege primitivaj. Oni ankoraŭ ne havis la cerbon preparita por ilin uzi. Kun ilia populariĝo, novaj cerbaj fakoj aktiviĝis. Tial oni povis, bezonis kaj postulis uzi pli detalajn mapojn.

Laŭ pricerbaj esploraj kriterioj, oni taksas tri el la teknikoj kiel tiujn, kiuj plej grave influis la homan menson: la alfabeto, la nombra sistemo kaj la Interreto.

## SENPAŬZA SKRIBADO

Ni esploru la inventon de la alfabeto kaj ĝian sekvon, la libron. Same kiel pri mapoj, sama evoluo de la cerbo okazis per la legado de post la kreado de la alfabeto. Komence la tekstoj estis skribitaj nur per la konsonantoj. Pro tio la prononcado de la nomo de Dio, laŭ la hebrea litero JHVH, estas hipoteza: Javeo, Jehovo...

La kreado de la kompleta greka alfabeto, ĉ. 750 a.K., kun 24 literoj, konsonantoj kaj vokaloj, multe helpis la populariĝon de ĝi. Tamen, ankoraŭ ne ekzistis spacetoj inter la vortoj nek inter la frazoj! Ni povas tion facile



"Ni inventas kaj moldas intelektajn teknikajn procedojn, sed ili inverse same regas kaj moldas nian konduton"

kompreni, ĉar ne ekzistas blankoj inter la paroloj. La skribado tiam reproduktis la voĉan kulturon. Tio nomiĝis latine *scriptura continua*. Tre malmultaj homoj povis legi tiutempe, kaj ili tion faris ĉiam laŭte. La praktiko de legado postulis de cerboj ne preparitaj grandegan mensan strebadon. Tial private kaj publike oni legis ĉiam laŭte. Ne ekzistis silenta legado. Oni rimarkas nuntempe, kiam infanoj komencas lerni legi, ke ili same laŭtlegas. Paŝoj al plena posedo.

Nur post la 12-a jarcento, kaj danke al la gravega laboro de monaĥoj kopiistoj dum la Mezepoko, la libro komencis anstataŭi la voĉan kulturon. En la komenco de la dua jarmilo, la malgranda tiutempa legantaro komencis postuli skribaĵojn kun reguloj sintaksaj pli striktaj (tiutempe oni ankaŭ ne multe zorgis pri la ordo de la vortoj en la frazoj), kaj en la 13-a jarcento la *scriptura continua* jam fariĝis grandparte kaduka.

La silenta legado, tamen, populariĝis nur depost la invento de la presado fare de Gutemberg. Ĝi respondecas pri unu el la plej rimarkindaj konkeroj en la historio de la homaro. De tiam la disvastiĝo de la konado okazis laŭ rapideco neniam antaŭe vidata. Tio kreis ankaŭ fiziologian adaptadon en la homa menso, ĉar la legado necesigis kompleksajn ŝanĝojn en la cerbaj konektoj por ne nur deĉifri la skribitajn signojn, sed ankaŭ por kompreni ties mesaĝon kaj rezoni pri ties ideo. La disvolvado de pensoj pli profundaj kaj pli abstraktaj komencis esti ebla al la plimulto ekde tiam.

## LA TIPOJ DE MEMORO

Nia cerbo enhavas du tipojn de memoro, la longdaŭran kaj la mallongdaŭran. Per la lasta ni tenas niajn tujajn impresojn kaj pensojn. Sed ĉio, kion ni lernas pri la mondo, ĉu konscie, ĉu nekonscie, konserviĝas en la

memoro longdaŭra. Aparta tipo de mallongdaŭra memoro estas la taska memoro aŭ labora memoro. Ĝi rolas grave en la translokado de informoj al la longdaŭra memoro. Sed tiu longdaŭra memoro estas rekonata nuntempe kiel la sidejo de nia kompreno. Ĝi stokas ne nur faktojn, sed ankaŭ kompleksajn konceptojn aŭ "mensajn skemojn".

Organizante disajn porciojn da informoj laŭ internaj modeloj, la skemoj liveras riĉecon kaj profundecon al nia pensado. La dimensio de nia inteligenteco dependas de nia kapablo transloki informojn de la tasko-memoro (mallongdaŭra memoro) al la longdaŭra memoro, kaj per tiu ĉi krei konceptajn skemojn. Tio tamen okazas sub nepra kondiĉo: strikta mensa koncentriĝo.

## KIO PRI INTERRETO?

La TTT, tuttera teksaĵo, kreis revolucion tiel grandan kiel tiu de

Gutemberg. Kompreneble ne estas necese laŭdi la utilojn de tiu teknikaĵo. Ĝi estas potenca ilo por disvastigado de informoj sur la ekranoj de niaj komputiloj kaj poŝtelefonoj. Sed ĝi ne cirkuligas nur vortojn, sed kune, - kaj samtempe - bildojn, sonojn, videojn, ligilojn. Ĝi akaparas ĉiujn niajn sentumojn, escepte (ĝis nun) de la flarado kaj gusto. Dum legado de interreta paĝo oni estas sub influo de reklamoj, tekstoj, ligiloj al aliaj paĝoj, menuoj maldekstraj, supraj kaj subaj, frazoj alikoloraj (hipertekstoj), kiuj sendas onin al aliaj tekstoj - ĉio estas kreita por suĉi, kapti, teni la atenton - kaj tempon. Sed domaĝe tia speco de teksto dispecigas la enhavon kaj ĝenas la koncentriĝon. Se oni tuttempe devas decidi ĉu musklaki, aŭ ne, sur ligilon, eĉ se nekonscie, la koncentriĝo iras for. Kiel asertite, koncentriĝo ĉefrolas dum la transiro de taska al longdaŭra memoro.



Sankta Aŭgusteno, en sia fama verko "Konfesoj", miras pro la kutimo de Sankta Ambrozio legi mallaŭte: "Kiam li legadis, liaj okuloj trairis la paĝojn kaj lia spirito penetradis ties sencon, tamen liaj lango kaj voĉo ripozadis. (...) Li legis silente (ordinare oni legadis laŭte tiutempe, kaj pro la malfacileco de la tekstoj, kaj pro la malofteco de la libroj, multfoje komune legataj) (...) malgraŭ ke eble li legis silente por ŝpari la voĉon (...)





Koma Zhang por *Quanta Magazine*. Fonto: mallonge.net/5s  
Paĝo de la aŭtoro: instagram.com/komaciel

## LA KUDRISTINA FINGRINGO

Jen la tubero en la afero: la tasko-memoro ne estas tia, kia la longdaŭra memoro, ege vasta. Kontraŭe ĝi povas manipuli nur malgrandan kvanton da informoj ĉiufoje. Imagu, ke vi penas plenigi banujon per kudristina fingringo. Tia estas la defio inter la du cerbaj memoroj. Kiam oni legas libron kun la atento koncentrata sur la tekston, tiam oni povas transloki al la longdaŭra memoro, fingringon post fingringo, la tuton aŭ almenaŭ la plej grandan parton de la informo. Kaj tie, en la longdaŭra memoro, fariĝas la riĉaj asociadoj, nemalhaveblaj por la kreado de la konceptaj skemoj.

Per Interreto, tamen, ni disponas je multaj kranoj da informoj, ĉiuj malfermegitaj. Nia malgranda fingringo superverŝiĝas de unu krano al alia. Ni translokas nur etan porcion al la longdaŭra memoro. La translokitaĵo mem estas miksaĵo el multaj kranoj, sed ne kontinua, seninterrompa, kohera verŝado el ununura fonto. Kiam tio okazas, al ni ne eblas reteni informon nek fari konektojn kun la materialo jam stokita en la memoro. Nia lernkapablo embarasiĝas, kaj nia kompren-

kapablo restas supraĵa. Ĉu hazarde nuntempe oni tiel ofte plendas kontraŭ mallernado pro atento-deficito?

## KIU ESTAS LA PRODUKTO?

Krome, malsimilie ol pri la libroj, kiujn vi pagas por legi, la tekstoj en interreto legeblas senpage. Sed iu devas pagi la kostojn, kompreneble. La solvo estas uzi reklamojn. Ju pli da reklamoj spektataj, des pli da mono al la retpaĝo aŭ apo. La entreprenantoj bezonas teni iel ajn la atenton de la uzantoj. Laŭ la ĵargono de interreto mem, "se io estas senpage, vi estas la produkto". Interreto estas do laŭnature neinterrompebla, kaj samtempe ĉiam interrompanta. De tio venas alia sekvo. Nia psiĥo ŝategas tujan rekompencan. Tial, por teni atentokaptita la mezan leganton, la interretaj iloj uzas mallongajn tekstojn. Oni iompostiole perdas la kapablon koncentriĝi dum duono da horo sur sama teksto. Oni kutimiĝas legi nur detranĉaĵojn da informoj entenatajn en la 280 literoj de Tvitero, aŭ enhavatajn en fotoj de Instagramo, aŭ en mallongaj mesaĝoj de Fejsbuko aŭ Vacapo.

Tuja rekomenco. Malprofunda. Malgrava. Efemera. La grandaj gazetoj jam malkovris tion. Pro tio, ke oni legas nur la titolon, maksimume la subtitolon de la artikoloj, la gazetoj redaktas ilin tute libere, ofte nefidele al tio kion la novaĵo mem informas, kelkfoje en senhonta kontraŭstaro al ĝi.

## LA PLEJ NOBLAJ TASKOJ

Estas jam sufiĉe klare, ke la cerbo ne estas neŝanĝebla, kiel oni antaŭ longe kredis. Ĝi moldiĝas al novaj situacioj, per reorganizado de neŭraj sistemoj, kaj ankaŭ per naskiĝo de novaj ĉeloj. Tio okazas ĉefe per la studado, per praktikado de novaj kapabloj, per plivastigado de la vortprovizo, de la memorado kaj de koncentrita kaj profunda legado. Tiuj aktivaĵoj helpas krei profundecon de nia inteligento. Por ĝui la bonaĵojn de interreto, kaj ne esti kaptita de ĝiaj malvirtoj, necesas esti singarda. Se ni malaktivigos pli kaj pli la cerbajn cirkvitojn respondecajn pri la longdaŭra memoro, ni perdos tion, kio faras la plej noblan taskon de ni mem, nome la kapablon lerni, esti kreemaj kaj pensi profunde. ■

# Túlio Flores

*Túlio Flores, eklerninte Esperanton en 1972, la sekvan jaron jam komencis instrui ĝin en Belo-Horizonto. En 1982 li komencis kompili, por privata uzo, sian Sliparan Vortaron, sur paperaj tajpitaj slipoj. Kelkajn jarojn poste, kiam li jam havis pli ol 35 mil slipojn, li kopiis iliajn enhavojn al komputilo. Per la helpo de la esperantisto Adonis Saliba, li aperigis la vortaron en la interreto en Septembro 2005, nun kun la nomo VTF - Vortaro Tulio Flores, enhavantan pli ol sesdek mil kapvortoj. (<http://vortaro.esperanto.org.br>)*

*En 2019, li iĝis membro de la Akademio de Esperanto, kun mandato ĝis 2022. Pri tiuj spertoj li parolas al la legantaro de BE.*



Túlio Flores, 2021.  
Memfoto por Brazila Esperantisto.

## **Kiel funkcias la Akademio de Esperanto?**

La Akademio de Esperanto (AdE) konsistas principe el 45 membroj, kiuj havas ĝenerale mandaton de 9 jaroj kaj estas reelekteblaj je la fino de tiu periodo. Ĉiun trian jaron okazas elekto de 15 membroj, kiuj okupos la lokon de tiuj membroj, kies mandato finiĝas en tiu jaro. Se dum tiu tri-jara periodo iu membro eliras el la Akademio, ĉu pro morto aŭ demisio, unu el la elektitoj en la sekva balotado okupos lian lokon kaj havos mandaton egalan al la tempo restanta, por kompletigi la mandaton de la eksmembro.

## **Kiu povas kandidatiĝi?**

Ĉiu esperantisto “kies kapabloj kaj agado sur la tereno de la Lingvo Internacia garantias lian kompetentan partoprenon en la laboroj de la Akademio” (el la statuto de la AdE). Krome li devas esti proponita de almenaŭ kvin Akademianoj, kiuj reprezentu almenaŭ tri malsamajn naciajn lingvojn.

## **Kiel vi, interalie, elektigi?**

La unuan fojon mi prezentis mian kandidatiĝon por la jaro 2016, sed mi ne havis sufiĉe da voĉdonoj por elektigi. Mi proponis min denove en la sekva elektoperiodo, kaj ĉi-foje mi estis elektita por tri-jara mandato.

Por mia kandidatiĝo mi prezentis mian vivresumon kaj laborplanon por mia agado en la Akademio. Krome mi asertis mian fidelecon al la Fundamento de Esperanto (FdE) kaj konsenton konstante kunlabori kun la Akademio.

## **Ĉu vi havis specifan celon?**

Mi En mia laborplano mi montris mian intencon kontribui por la ciferecigo de la teksto de la FdE kaj ebligi, ke oni havu tute ĝustan kaj fidindan tekston de ĝi por eventuala aperigo en la retejo de la Akademio kaj por presado de nova papera eldono de la Fundamento, eble kun la Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro.

## **Kiel organiziĝas la laboro en la AdE?**

La laboro en la Akademio okazas en Sekcioj kaj Komisionoj. La sekcioj zorgas pri Esperant-lingvaj aspektoj, dum la Komisionoj zorgas pri ne-lingvaj aferoj.

Kiam mi enposteniĝis, mi kreis komisionon por la nova eldono de la Fundamento kaj fariĝis ĝia direktoro. Mi partoprenas ankaŭ en la sekcio pri gramatiko.

*“AdE havas la taskon konservi la fundamentajn principojn de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon.”*

## **Kiuj Sekcioj kaj Komisionoj ekzistas?**

Nuntempe funkcias la jenaj Sekcioj: Faka lingvo, Gramatiko, Ĝenerala vortaro, Lingva konsultejo de la AdE, Literaturo, Prononco kaj Kontrolado de lerniloj; kaj la jenaj Komisionoj: Historio de la AdE, Homaj nomoj, Nova eldono de la Fundamento, Komunikado.



## ***Kion vi opinias pri la rolo de la Akademio?***

Ĝi havas la taskon konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon. Per la nova eldono de la Fundamento - ne nur papera, sed ankaŭ laŭ aliaj elektronikaj formatoj - mi intencas popularigi ĝin kaj ebligi, ke aperu novaj tradukoj al la naciaj lingvoj, same kiel mi faris en 2015 per la eldono de la brazila versio de la Fundamento. Ĝuste tiu laboro atentigis min pri la neceso de nova eldono, ĉar la ĝisnunaj eldonoj de tiu grava verko estas simpla fotorepreso de la unua eldono de 1905 kaj en pluraj lokoj la teksto jam fariĝas iomete malfacile legebla. Krome en ili mankas la Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro, kaj mi volas, ke en la nova eldono ĉiuj tiuj informoj estu facile konsulteblaj de ĉiuj esperantistoj.

## ***Kiun utilon portos tiu laboro?***

Per tio oni povos prezenti la Fundamenton al novaj generacioj de esperantistoj, diskuti ĝian valoron por la unueco de nia lingvo kaj memorigi nin ĉiujn pri la danĝero de la reformemuloj, kiuj ĉiam minacas la vivon de Esperanto, ĉefe en ĉi tiu tempo de interreto, kiam per kelkaj tuŝoj de la komputila klavaro aŭ klakoj de la muso oni povas en kelkaj sekundoj atingi milojn aŭ eĉ milionojn da homoj.

*"La riĉigado kaj evoluo de Esperanto povas okazi sen problemo, se oni sekvas la konsilojn montritajn en la Antaŭparolo de la FdE."*

La riĉigado kaj evoluo de Esperanto povas okazi sen problemo, se oni sekvas la konsilojn montritajn en la Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto. Estas tasko de ĉiuj

bonaj esperantistoj kaj speciale de la Akademio de Esperanto zorgi pri tio.

## ***Vi tradukis kelkajn kanzonojn por Brazila Kolekto. Kiuj aliaj esperantaj aktivajoj okupas vian tempon?***

Mi ne tradukas kanzonojn nuntempe, kvankam mi ŝatus traduki kelkajn, kiujn mi ekkonis lastatempe, sed mankas al mi tempo por tio. Ekde februaro mi estas membro de la teamo de redaktantoj de la venonta eldono de PIV. Tamen pri tiu laboro mi ne povas paroli multe, ĉar mi ankoraŭ nur lernas la teknikan parton de la redaktado. Krom tio, mi gvidas kurson pri tradukado al grupeto de ses invititoj. La kurso okazas per interreto pro la pandemio kaj pro tio, ke kelkaj el la kursanoj loĝas en malsamaj urboj. Eble el tiu provo mi sukcesos krei formalan kurson. ■

BEJO

## **LITERATURA KONKURSO PAULO SILAS**

Iam naskiĝis en la brazila ŝtato Cearao floro, kiu ellasis sian parfumon per versoj kaj verkoj. Ĝia historio estis mallonga, sed vigla. Ĝi estis la junulo [Paulo Silas Rodrigues Sena](#) (1990 – 2017).

Por instigi kaj pliflorigi tiel parfumajn florojn, la Brazila Esperantista Junulara Organizo - BEJO starigas la duan eldonon de la Literatura Konkurso Paulo Silas, celante trovi potir-florojn ("potyra" estas floro, en la tupia lingvaro), kiuj, per versoj aŭ prozo, havu ŝancon disvasti sian parfumon kaj eĉ profiti plurajn premiojn, kiel dankon pro sia strebado.

La unua eldono okazis dum la 38-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK), en Kuritibo (la ĉefurbo de la ŝtato Paranao), en 2018.

Se en la 1-a de Januaro 2021 vi estis malpli ol 30-jara, sendu viajn verkojn ĝis la 16-a de Septembro, kondiĉe, ke vi ilin verku en Esperanto, ke ili estu novaj kaj neniam antaŭe estis eldonitaj en ajna formo.

Kiu scias, ĉu via talento ne vervas, kiom vervis tiu de nia karmemora Paulo Silas?

2-A LITERATURA KONKURSO PAULO SILAS

Regularo kaj aliĝilo:  
<https://mallonge.net/kpsr>

# ESPERANTA KAFEJO

Anna Lobo

Ekde la komenco de 2020, pro la pandemio de KOVIM-19, multaj asocioj, devigitaj provizore fermi siajn pordojn, eklaboras pli multe en retaj medioj. Ĉe la Esperanta Asocio de Ŝtato San-Paŭlo ne povus esti malsame. Kaj unu el tiuj projektoj de la Asocio estas la starigo de EASP-Kafejo.

Pri kio temas tiuj kafejoj?

Temas pri retaj renkontiĝoj, kiuj okazas ĉiusabate je la 17-a, laŭ la brazila horeco, pere de reta babilejo (Zoom, Jitsi aŭ Google Meet). Kaj tiam ni renkontiĝas kaj babilas libere pri diversaj temoj. En tiu momento, oni amikiĝas, praktikas la lingvon kaj amuziĝas en agrabla etoso.

Kaj oni ne forgesu pri la kafumo, ĉu ne? Tiu estas horo, en kiu oni trinkas kafon kaj manĝetas en Brazilo, ofte ligita al paca kaj agrabla etoso, en kiu oni sidas por babili kun familianoj kaj amikoj. Kafumado estas arto kaj grava eco de brazila kulturo, ĉefe en la ŝtato Minas-Ĝerajso, kiel ankaŭ la ŝtato San-Paŭlo mem.

La renkontiĝoj en 2021 jam rekomenciĝis, kaj sidas ĉirkaŭ 10 partoprenantoj ĉiu-semajne. Foje eĉ aperas eksterlandanoj por kunbabili. Ĉiam estas tre agrabla momento. Ĉu vi interesiĝas kuniĝi al tio?



Sekvu la kafumantojn ĉe la paĝo de Facebook kaj akompanu novaĵojn pri la afero kaj multe pli: [www.facebook.com/esperanto.sp](http://www.facebook.com/esperanto.sp)

## En la Reto

### BEL EN TELEGRAMO

La nova interreta kanalo de la Brazila Esperanto-Ligo en la mesaĝo-servo Telegramo nomiĝas "Amigos do Esperanto", kiu faros elsendojn minimume ĉiun duan semajnon, ĉefe al tiuj homoj kiuj amikas al E-o, eĉ se ili ankoraŭ ne aktive ĝin uzas.



<https://t.me/amigosdoesperanto>

### RETRADIO

Ĝus fariĝis 10-jara la iniciato de la aŭstra aktivulo Anton Orberndorfer, kiu ĉiutage disponigas son-registraĵojn pri plej diversaj aktualaj temoj: plezuro por veteranoj kaj efika maniero plibonigi lingvo-nivelon de la progresantoj.



<http://retradio.dr.ag/>

### PIV EN LA RETO

Nia ĉefa vortminejo, Plena Ilustrita Vortaro, havas avantaĝan retpaĝon kun praktika serĉilo kaj multaj interesaj informoj pri la enhavo de ĉiu trovita vorto.



<https://vortaro.net/>





## César Dorneles

Kiam mi estis infano, mi havis mian unuan kontakton kun Esperanto per ekzemplero de la portugallingva Curso Prático de Esperanto (Praktika Kurso de Esperanto) de Ferenc Szilágyi. Tio okazis, ĉar mia patro partoprenis en kelkaj lecionoj de kurso pri la lingvo. Li rezignis la kurson, sed konservis la lerno-tekstojn sur sia librobretaro, kiu entenis Método de Esperanto de Ismael Gomes Braga. Mia scivolemo, kiam mi foliumis la verkon de Szilágyi, sin direktis al la kuriozaj ilustraĵoj rilataj al la fikciulo Adamson... Mia patro poste klarigis al mi, pri kio temis tiu "stranga" lingvo...

En Prago (1996) mi estis partoprenanta en la Universala Kongreso de Esperanto kaj mi iutage troviĝis en la restoracio de la impona kulturdomo, en kiu la evento realiĝis, sidanta ĉe la verŝotablo por trinki kafon, se mi bone memoras... Tiam mi ekbabilis kun japano, kiu sidis apud mi, kaj jen li demandis al mi pri mia profesio. Mi respondis, ke mi estas instruisto. Li tuj sin turnis al siaj samlandaj kunuloj sidantaj aliflanke kaj komentis al ili, ke mi estas instruisto. Ĉiuj rigardis min kun granda admiro sur la mieno... Fine, ĝuinda momenteto en kiu la japana spirito pri respekto kaj valorigo de la instruistoj trafis min.

"Onidire estas aliaj marbordoj trans la oceano. Tia tipo de afero estas granda malvero, ĉar la oceano ne povas esti transnavigebla." (Seneko)



El "Prodigiorum Liber" (Libro de Mirindaĵoj), de Julius Obsequens.  
Fonto: mallonge.net/d6

"Io kio similis al ŝipo brilis sur la ĉielo...", "Io kio similis al granda floto estis ekvidita sur la ĉielo en L a n u v i o , proksima al Romo." (citita de Tito Livio en lia libro Historio de Romo).

En la urbo Takikawa, en Japanio, la terkultivistoj havas novan alternativon por forpeli la predantojn, ekzemple ursojn, el la plantejoj, pere de la instalo de du mekanikaj lupoj. Tiuj robotoj, kiuj estas altaj je 2,6 m, havas malveran felon, videblajn dentojn kaj ruĝajn okulojn, kaj krome ili balancas la kapon, se ne paroli pri la eligo de hurloj, bojoj kaj pafoj, por ke la ursoj ne al kutimiĝu...




La mekanika lupoj de Takikawa.  
Fonto: mallonge.net/d5

El usonaj kontraŭdrogaj filmoj pri mariĥuano en la 40-aj jaroj: Nur unu sorbo kaj vi povos fariĝi

- samseksemulo,
- murdisto,
- komunisto.

James Joyce (1882-1941), irlanda verkisto, de tempo al tempo reviziis sian ĉefverkon Ulysses (Uliso).

Pierre Bonnard (1867-1947), franca post-impressionisma pentristo, kutimis viziti galeriojn kaj muzeojn portanta penikojn kaj farbon, por kaŝe ete refari siajn pentraĵojn. ■



Memporeto de Pierre Bonnard.  
Fonto: mallonge.net/d7

# NIA LITERATURA PANTEONO:

## Kálmán Kalocsay

Malfacilas redoni la gravecon de nia plej brila poeto, Kálmán Kalocsay (Kaloĉaj), por Esperantujo. La hungara kuracisto estis ano el la fruaj tempoj, esperantistiĝis en 1911, fariĝis poligloto, tradukisto, gramatikisto, redaktoro, kaj grandskale influis la evoluon kaj de la literaturo kaj de la lingvo mem.

Li eldonis la epokfaran revuon Literatura Mondo, la plej gravan literaturan esperantan periodaĵon inter 1922 kaj 1949, kiu iĝis ĉefa heroldo de la nomata Hungara Skolo, kuniginte nomojn kiel Julio Baghy, Ferenc Szilágy, Lajos Tárkony.

Apud lia vasta originala poemaro, li esperantigis malfacilajn verkojn, kiel Infero de Dante, tri verkojn de Ŝekspiro, poemojn de Baudelaire, Heine, Petőfi, Goethe, Madách... kaj verkis la duvoluman antologion Tutmonda Sonoro kun liaj tradukoj el 30 lingvoj.

Ĉe la lingva flanko, Kalocsay kunaŭtoris, kun Waringhien, nian Plena Analiza Gramatiko (1935) kaj Parnasa Gvidlibro (1932); Li ankaŭ estis aŭtoro de Lingvo Stilo Formo (1931), La Gramatika Karaktero de la Esperantaj Radikoj (1938), Vojaĝo



Kálmán Kalocsay, 1921.  
Portetra foto, nekonata aŭtoro.  
Fonto: mallonge.net/d8

Inter la Tempoj (1966) kaj frazeologia vortaro Domfabriko (1975).

Okaze de lia 45-a mortodatreveno lastfebuare, ni omaĝas al tiu giganto per originala poemo tradukita samrime kaj samskande en la

portugalan, elektita el la volumo STREĈITA KORDO, pri kio skribis Tárkony okaze de ĝia ekapero: "okazis io ankoraŭ ne ekzistanta en nia lingvo kaj literaturo, okazis io nova: poemlibro, kiu meritas, ke oni lernu Esperanton nur por povi ĝin legi". ■

### Kanto de vagabondo

Kálmán Kalocsay

*La polv' sur mia plando:*

*Jen estas mia lando.*

*Kaj lito mia: ĉies ter',*

*Kovrilo mia: la vesper'.*

*Birdar' al mi deĵoras*

*Per amuzanta ĥor',*

*La nuboj min priploras,*

*Se tuŝas min dolor',*

*Hej, hola! Kia granda ĝoj':*

*Facila vag' sur landa voj'!*

*Mi vagas preterfluge,*

*Sencele kaj senjuge,*

*Kaj al knabino, al amik'*

*Neniam ligu min radik'!*

*Radiko ja profunde*

*Pentras en la ter'*

*Kaj ĝi ŝiriĝos vunde.*

*Ni ŝparu pri l' sufer'!*

*Hej, hola! Kia granda ĝoj'!*

*Ensola vag' sur landa voj'!*

*En blu' de malproksimo*

*Sin banas la animo,*

*Dum inter prema ĉambra lim'*

*La koron kovras ranca ŝim'.*

*Filistro-invalido*

*Do putru en la niĉ'!*

*Mi saltas el la sido*

*Kriante pro l' feliĉ',*

*Se vokas min por granda ĝoj',*

*Por nova vag' la landa voj'.*

*Ĉu lumas sort', ĉu nigras,*

*Mi prifajfante migras.*

*Kaj kiam kontraŭ la stomak'*

*Malsato venas por atak':*

*Dum la stomak' eksonas*

*Grumblante, kun riproĉ',*

*Mi primon fajfe donas*

*Al ĝia basa voĉ'.*

*Hej, hola, kia granda ĝoj',*

*Eĉ la malsat' sur landa voj'!*

*Kaj se pleniĝis listo,*

*Kaj venos la Falĉisto:*

*Post mi edzino kaj infan'*

*Ne ploros orfe kaj sen pan'!*

*Mi falos en la neĝo:*

*Adiaŭ, bela vag'!*

*Kaj la primorta preĝo*


*Nur estos korva grat'.*

*Anoncos poste hunda boj'*

*Kadavron sur la landa voj'.*







*Izolo.* K. Kalocsay  
80 p.  
Universala Esperanto Asocio  
Budapeŝto, 1977  
R\$25,80  
[belabutiko.esperanto.org.br](http://belabutiko.esperanto.org.br)

## Canção do vagabundo

(Trad.: Cícero Soares)

*O pó no meu solado:  
Tá aí o meu Estado.  
Meu leito: terra sem senhor,  
O anoitecer: meu cobertor.  
Coral de passarinho  
Me arrenda uma canção,  
O céu chora baixinho  
Se dói meu coração,  
Ah, viva! Como estou feliz:  
Pelas estradas sem país!*


*Assim como quem voa  
Sem canga, vou à toa.  
E a amigos, amores que eu fiz  
Jamais me prende algu'a raiz!  
Raiz profundamente  
Se entranha pelo chão  
E ele se rasga, sente.  
Não, tanta dor mais não!  
Ah, viva! Como estou feliz  
Só - nas estradas do país!*

*No azul do bem distante  
Se lava a alma da gente.  
Mas nas paredes dos salões  
Mau cheiro mofa os corações.  
No nicho apodreça,  
Inválido burguês!  
Já salto de cabeça  
Sorrindo pra vocês  
Se chama-me pra ser feliz  
O pó da estrada do país.*

*Sorte ou azar, amigo,  
Tô nem aí, prossigo.  
E quando a fome vem bater  
As tripas ouço a gemer.  
Já mortas de cansaço  
Resmungam com furor.  
Segunda voz eu faço  
Pra sua voz tenor.  
Ah, mesmo assim estou feliz  
Com fome ao léu pelo país!*

*E ao chegar a Hora  
Da Vida ir-me embora:  
Mulher nem filhos ficarão  
Chorando órfãos e sem pão.  
Eu vou tombar na estrada:  
Vagabundagem, adeus!  
E a extrema unção vem dada  
Por urubus ateus.  
Um cão latindo chega e diz:  
Mais um cadáver no país.*

Statuo omaĝe al la  
brazila vagabondo  
José "Juquinha" Patricio,  
en Montaro de Cipó,  
Minas Ĵerajso.  
Fonto: mallonge.net/el



## VIA UNUA ARTIKOLO EN BRAZILA ESPERANTISTO

Leandro Abrahão

Ni scias, ke multaj esperantistoj iam deziris verki la unuan fojon por iu esperantista gazeto, kaj ankoraŭ ne verkis. Eble vi ricevas la pli ol 100-jaran Brazilan Esperantiston kaj neniam verkis por ĝi. Nu, jen la okazo!

Debutanta artikolo ricevos stampon speciale produktitan. Ĝi signos vian premieron kiel artikolisto. Tamen, ni atentigas vin: pripensu antaŭ ol ekverki. Povas esti, ke vi de tiam ne plu povos ĉesi artikoladi. Se entute tio okazos, Brazila Esperantisto ĝojos, kaj ankaŭ la brazila esperantistaro.

Se via unua ekpenso estis "ĉu mi?", bonvolu legi plu, ni petas. Por ion verki artikole ne necesas aparta talento. Por ekverki ion sufiĉas... havi ion por diri. Ion interesan. Ion, kio povas interesi aliajn personojn krom vi mem. Jen kvar konsiloj:

1) Permesu al vi naski ideojn, antaŭ ol redakti ilin. Pro tio ni rekomendas: preferu kraĵonon kaj paperfolion (pri tio skribas la usona aŭtoro Austin Kleon).

2) Ne ekskomuniku vian tekston tuj post la verkado. Indulgu ĝin (kaj vin) kaj permesu al ĝi kuŝi sur via tablo aŭ en tirkesto dum almenaŭ unu tago. Rezistu al la tento ĉifi kaj forĵeti ĝin.

3) En la venonta tago, aŭ iam poste, reprenu ĝin, relegu, redaktu. Se la emo simple ĉifi ĝin kaj ĵeti ĝin al la muro (jes, tio povas okazi) ne forlasis vin, faru. Alternative, notu ĉion, kio en ĝi bonas (ne estu tiel rigora... io en ĝi bonas, ni estas certaj). Rekomencu de tio, kion vi ĵus notis.

4) Hura! Vi finis! Nu, atendu... antaŭ ol sendi ĝin al la redakcio, sendu ĝin al iu esperantisto. Petu, ke li tralegu vian artikolon. Li certe rimarkos aferojn, kiujn vi mem ne rimarkis antaŭe (ni ne aludas nur tajperarojn kaj mankon de akuzativo).

Poluru vian tekston kaj sendu ĝin al [redakcio@esperanto.org.br](mailto:redakcio@esperanto.org.br) (ne pensu pri longeco. Pri tio zorgos la redaktoroj). ■

# ŜTATAJ LERNEJOJ EN SAN-PAŬLO KAJ LA INSTRUADO DUM LA PANDEMIO

Nympha Aparecida



En la ŝtato San-Paŭlo, Brazilo, la publikaj lernejoj adoptis distancan instruadon dum la lernojaro 2020. La lernejoj kaj la instruistoj estis orientitaj uzi ŝtatajn informadikejojn kaj ankaŭ privatajn rimedojn, ekzemple Vacapon, por kontakti lernantojn kaj helpi ilin. La instruistoj devis postuli lernotaskojn al la lernantoj, kaj taksu iliajn profitojn kaj ĉeestojn.

Atestoj de instruistoj, lernantoj kaj gepatroj raportis malfacilaĵojn pri alirebleco kaj malgranda partopreno de la lernantoj, tiel en la perretaj lecionoj, kiel en la proponitaj aktivaĵoj. La malaprobado estis preskaŭ plena. Fine okazis oficiala orientado, por ke la aprobado estu preskaŭ aŭtomata, kio en la praktiko fariĝis senescepta.

En 2021 komenciĝis ĉeestaj lecionoj, unue kun nur 35% el la gelernantoj, sub observado de sanitaraj normoj, por eviti la disvastigon de la kovimo-19. Por sekureco, la gepatroj povis elekti ne sendi siajn gefilojn. Ĉiu lernejo memstare organizis siajn aktivecojn. Tamen, ĉiuj geler-

nantoj kaj geinstruistoj devis plenumi la lernotaskojn el la Informadika Centro. Tio tute forprenis la memstarecon de geinstruistoj kaj duobligis la taskojn, kaj de la iinstruistaro kaj de la lernantaro. Aliflanke, la aŭtomata aprobo en la lasta jaro, kontraŭante la oficialan klarigon dum la tuta jaro, malkuraĝigis instruistojn kaj malstimulis lernantojn. Nuntempe, labori kun instruatoj fariĝis pli malfacila ol iam ajn.

Sekve, la tiel nomata “hibrida instruado” dume nur prezentas problemojn preskaŭ nesolveblajn, pro la malfacilaĵo je alirebleco, tiel de instrustoj kiel de lernantoj.

La instruaj celoj, enhavoj kaj lertecoj jam estas difinitaj por nacia kaj ŝtata niveloj, kaj en kelkaj lokoj eĉ por urba nivelo. La geinstruistoj devas, kiel ili jam faras, organizi siajn lecionojn kaj aktivecojn celantajn la gelernantojn laŭ ties vera situacio. Tiucele ili daŭre aplikos ekzamenojn, postulante kaj korektante taskojn kaj aliajn aktivaĵojn. Ĉio devas esti zorge

planita, plenumita kaj analizita de geinstruistoj kaj gelernantoj.

Nepre estu, kiel jam okazas, eksteraj taksadoj – ŝtataj kaj tutlandaj –, por mezuri la kvaliton de instruado proponita de la instrua sistemo. Tamen neniam ili devus esti uzataj por meritokratecaj celoj, por kromsalajra pago aŭ similaĵo celantaj lernejojn kaj instruistojn. Ili devus ja esti uzataj por havigi al la instruistoj kaj lernejoj kun nekontentigaj laborrezultoj, plibonigajn kursojn kaj ankaŭ plibonajn laborkondiĉojn, kiel konstruereformon de la lernejo, de meblaro, de ekipaĵoj, ekzemple de biblioteko, pilko-ludejo, sporta kaj informadika materialoj ktp.

Ĉiu kolektiva klopodo devas fariĝi por disvolvi motivigon cele al perfektigo, tiel ke ĉiuj plenumu kiel eble plej bone siajn agadojn, ĉu en lernejo, ĉu en laborejo, ĉu kiel salajruloj, ĉu kiel entreprenantoj. Ili ankaŭ devus partopreni en la socia kaj politika vivoj kiel civitanoj konsciaj, respondecaj kaj kompetentaj strebante por la komuna bono. ■

## La Unua Esperantlingva Kurso de Parolarto nun libere alirebla!

La plej tikla afero rilate parolarton estas ne tio, kiel oni movas la manojn aŭ voĉas, sed la nescio pretigi prelegoplanon.

Ĝuste tion, kaj ne nur, solvas la esperantlingva retkurso #forlaflatado: lernu prelegi en 10 simplaj paŝoj. La metodo estas bazita sur la principoj de TED TALKS - nuntempe la plej elstara ekzemplo de efikaj kaj trafaj prelegoj.

La kurso konsistas en 12 ĉ. sep minutojn longaj videolecionoj, kiujn oni povas spekti iam ajn, kiom da fojoj oni deziras, per poŝtelefono mem.

La kurso taŭgas ne nur al tiuj, kiuj deziras komenci prelegi, aŭ kiuj prelegas kaj ankoraŭ ne kontentas pri la propraj rezultoj, sed al iu ajn, kiu deziras lerni prezenti ideon, iun ajn.

Aliĝu tuj ĉe: [forlaflatado.com/retkurso](http://forlaflatado.com/retkurso)



Ofertas la retkurson:

#forlaflatado  
Lernu prelegi en 10 simplaj paŝoj

[www.forlaflatado.com/retkurso](http://www.forlaflatado.com/retkurso)



# PLIRIĈIGU VIAN VORTPROVIZON

Leono de Bonaero

## 1) adult/o

- A. Plenaĝulo, plenkreskulo.
- B. Alpreno de iu kiel propran filon.
- C. Malrespekto al la geedza fideleco.

## 2) avi/o


- A. Karesvorto por avino.
- B. Aeroplano, aviadilo.
- C. Deziro de akiro.

## 3) klaroskur/o

- A. Malforta lumo, kies radioj estas malhelpataj de maldiafanaĵoj.
- B. Pentra efekto, kiu imitas aŭ akcentas la kontraston inter lumigitaj kaj senlumaj objektoj.
- C. Nehela lumo, kiun estigas sunaj radioj resenditaj de la tera atmosfero post subiro de Suno k antaŭ ĝia leviĝo.

## 4) kupe/o

- A. Aŭtomobilo kun tegmento kaj du pordoj kaj plej ofte nur du sidlokoj.
- B. Parto de veturilo, vagono ks. apartigita disde aliaj, kun aparta pordo.
- C. Elĵeto de salivo el la buŝo.



HikingArtist. Fonto: mallonge.net/75

## 5) magazin/o

- A. Perioda revuo, ĝenerale ilustrita.
- B. Vendejo pli granda kaj diversvara ol butikoj.
- C. Pafila ŝargilo.

## 6) maestr/o

- A. Instruisto.
- B. Ordonrajta posedanto.
- C. Persono posedanta universitatan diplomon pli altan ol tiu de licencio.

## 7) prov/o

- A. Argumento aŭ fakto, per kiu oni povas montri la verecon de io.
- B. Pena agado por atingi aŭ realigi ion.
- C. Antaŭaranĝita sporta batalo inter konkurantoj, laŭ difinitaj reguloj kaj rekompencoj, kun juĝantaro el aparte elektitaj personoj.

## 8) rif/o

- A. Enmara danĝera roko, kies supro preskaŭ elstaras el la akvo.
- B. Mallonga melodia frazo, kiun muzikistoj ripete reludas, foje kun malgranda variado.
- C. Hazardludo laŭ kiu la partoprenantoj ricevas numeritajn biletojn, kiuj rajtigas ilin al ŝancoj pri gajno montrata de la sorto.

## 9) son/o

- A. Stato de korpa k intelekta senaktiveco.
- B. Imagaĵo, psika bildo, kiun oni faras al si pri ia dezirataĵo
- C. Aŭdebla aervibrado.

## 10) sputnik/o

- A. Kontraŭ-KOVIMA vakcino.
- B. Artefarita satelito de Tero.
- C. Spacveturilo.

Respondo en paĝo 14

## Respondo

1) adult/o: C. Malrespekto al la geedza fideleco.

"Kaj la skribistoj kaj Fariseoj alkondukis virinon, kaptitan en adulto."

Evangelio laŭ Johano (8,1-11). La Sankta Biblio - Nova Testamento 1926 (Esperanto Londona Societo).

2) avi/o: B. Aeroplano, aviadilo.

"Tiam la pasaĝeraj avioj, kiuj funkciis per helicoj, estis relative malrapidaj, malgrandaj kaj ne multnombraj."

Ĉu ni mortu miskomprene? Gilbert Ledon. Rubriko: El mia vidpunkto. (Monato 2000/08, p. 5)

3) klaroskur/o (ankaŭ skribata klarobskur/o): B. Pentra efekto, kiu imitas aŭ akcentas la kontraston inter lumigitaj kaj senlumaj objektoj.

"Dum tiuj 12 jaroj, impresionistoj travivis malfacilaĵojn, ricevante kritikojn kaj mokridojn, ĉar ili ignoris la teknikojn de perspektivo, modlado kaj klarobskuro, kiujn oni bezonis por fari tradiciajn pentraĵojn."

Kial naskiĝis impresionismo? Verkis: MATSUMOTO Midori (Kontakto n-ro 263 - 2014:5, p. 14)



Junulino kun perla orelingo (Meisje met de parel) (1665), de Johannes Vermeer.

4) kupe/o: B. Parto de veturilo, vagono ks. apartigita disde aliaj, kun aparta pordo.

"Ni alproksimiĝis al unu kupeo de kvara klaso, el kiu venis la sono, kaj ekrigardis tra la fenestro."

Vojaĝimpresoj (el Lingvo Internacia). Verkis: Valdemar Langlet. Eldonis: Inko, Tyresö, 2002. Proksimuma verkojaro: 1895.

5) magazin/o: A. Perioda revuo, ĝenerale ilustrita.

"[...] li iris al kiosko por aĉeti gazeton kaj magazinon (sekvi spionon tuttage eble ja enhavos longajn horojn da atendado, dum kiuj tiuj estos bonvenaj), [...]"

Ĉu rakonti novele?, Claude Piron sub la plumnomo Johán Valano, 1986

6) maestr/o: B. Ordonrajta posedanto.

"De sia volo li ne estas mastro."

Hamleto: reĝido de Danujo. Verkis: William Shakespeare. Tradukis L. L. Zamenhof, 1893. Eldonita en Nurnbergo, 1894.

7) prov/o: B. Pena agado por atingi aŭ realigi ion.

"Kaj tial nia plano devas havi Eliron en rezervo por l' okazo, Se la unua provo ne prosperos."

Hamleto: reĝido de Danujo. Verkis: William Shakespeare. Tradukis L. L. Zamenhof, 1893. Eldonita en Nurnbergo, 1894.

8) rif/o: A. Enmara danĝera roko, kies supro preskaŭ elstaras el la akvo.

"[...] Nia ŝipo trafis rifon kaj subakviĝis, kaj ĝin ni ne vidis plu."

Robinsono Kruso. Verkis: Daniel Defo. Tradukis en 1908 Pastro A. Krafft. Eldonis: Henry Altemus Company Philadelphia, 1908.

9) son/o: C. Aŭdebla aervibrado.


"Ho, dolĉa voĉo! Agrablega sono De l' hejma lingvo en la fremda lando!"

Ifigenio en Taŭrido. Verkis: Goethe. El Germana lingvo tradukis D-ro L. L. Zamenhof. Eldonis: Hachette et Cie., Paris, 1908 kaj Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin, 1908.

10) sputnik/o: B. Artefarita satelito de Tero.

"Ni ne estas antikvaj ĉinoj; oni ne povas enorbitigi sputnikojn pere de pulvo!"

Noveveninto. Verkis: Donald J. Harlow, 1963.




Sovetia satelito Sputnik-1 (Спутник-1). Fonto: mallonge.net/em

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 - 4: bona;  
5 - 7: bonega;  
8 - 9: elstara;  
10: escepta



Rifoj proksime de la Maldivoj. Fonto: mallonge.net/er



# LINGVA LUDO

Nia Esperanta Proverbaro estas riĉa trezoro de esprimoj, parolturnoj kaj kulturo. Per ĝi oni povas facile lerni modelan sintakson kaj pligrandigi sian vortprovizon.


Sube estas kelkaj proverboj pri la temo **AMIKECO**.

Sed, *ĉar sen laboro ne venas oro*, kompletigu la mankantajn vortojn de ĉiu, kaj ĝuu ilian saĝecon.

## Vortmenuo:

ankaŭ - batu - bono - dato - fidela - karesu - komerco - konsolas - lango - lupon - malamiko  
malproksima - novan - ofico - parenco - piko - publika - pruntedono - ripetas - valoras

- 1) Amikeco aparte, \_\_\_\_\_ aparte.
- 2) Amiko de amiko estas \_\_\_\_\_ amiko.
- 3) Amiko \_\_\_\_\_ estas trezoro plej bela.
- 4) Amikon \_\_\_\_\_, sed kalkuli ne forgesu.
- 5) Amikon ŝatu, malamikon ne \_\_\_\_\_.
- 6) Amu domon \_\_\_\_\_ kaj amikon malnovan.
- 7) Estinta amiko estas plej danĝera \_\_\_\_\_.
- 8) Kiso \_\_\_\_\_ estas kiso malamika.
- 9) Kiu multe parolas, malamikon \_\_\_\_\_.
- 10) Mia \_\_\_\_\_ - mia malamiko.
- 11) Ne ekzistas en la \_\_\_\_\_ amikeco nek ŝerco.
- 12) Perdiĝas per \_\_\_\_\_ amiko kaj mono.
- 13) Pli bona amiko intima, ol \_\_\_\_\_ malproksima.
- 14) Plibono - estas malamiko de \_\_\_\_\_.
- 15) Por amiko intima ne ekzistas vojo \_\_\_\_\_.
- 16) Pro vorta \_\_\_\_\_ ofte perdiĝas amiko.
- 17) Se amiko petas, li neniam \_\_\_\_\_.
- 18) Ŝatu amikon laŭ la \_\_\_\_\_ de akiro.
- 19) Timu \_\_\_\_\_ edukitan kaj malamikon repacigitan.
- 20) Unu amiko malnova pli \_\_\_\_\_ ol du novaj.



Solvej:  
1. ofico 2. ankaŭ 3. fidela 4. karesu 5. batu 6. novan 7. malamiko 8. publika 9. konsolas 10. lango 11. komerco  
12. pruntedono 13. parenco 14. bono 15. malproksima 16. piko 17. ripetas 18. dato 19. lupon 20. valoras

# 55 CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

2º CONGRESSO VIRTUAL DA JUVENTUDE  
ESPERANTISTA BRASILEIRA

**BRASIL EM PERSPECTIVA:  
CENÁRIOS E CONJUNTURAS**

**12 A 15 DE AGOSTO DE 2021**

**INSCRIÇÕES:**

**ESPERANTO.ORG.BR/KONGRESO**



Organização  
da Juventude  
Esperantista  
Brasileira



Liga  
Brasileira  
de Esperanto

Remetente:  
Liga Brasileira de Esperanto  
SDS, Ed. Venâncio III - sala 303  
70393-902 Brasília-DF

Farita per:



*Fechamento autorizado. Pode ser aberto pela ECT*

esperanto.org.br